



Universala Kongreso en Jokohamo

Robert Stalzer



Mia edzino kaj mi estis feliĉaj pro la vizito de ĉi-jara UK en Jokohamo, kie ni ne nur ekvidis la malnovajn amikojn kaj spertis novajn aventurojn, sed ankaŭ renkontis patrinon de Sepideh, kiun ŝi ne vidis dum la longaj 17 monatoj. Mia bopatrino venis de Irano kun aliaj 14 geesperantistoj, kaj tio ĝojigis ĉiujn.

“Okcidento kaj Oriento: akcepto kaj rezisto” estis la kongresa temo. Laŭteme okazis multaj programeroj kaj diversspecaj E-grupoj pridiskutis ĝin. Tamen ni ankaŭ ĝuis aliajn aranĝojn, nome: poezian vesperon, kimono-vestadon por virinoj, lecionojn de tradiciaj japanaj artoj, libroservon. Kiel kutime okazis multaj por-plezuraj programeroj. En la Kanagawa provinca koncertejo taiko-tamburistoj prezentis sian ludon je tamburegoj. Litova muzikteamo “Asorti” plenumis E-kantojn je la alta profesia nivelo. Neforgesebla estis ankaŭ Nacia vespero de tradiciaj japanaj dancoj kaj muziko. La kongreson entute partoprenis 1901 registritaj E-istoj el 57 landoj, inkluzive 31 usonaj gesamideanoj, 959 japanaj kaj 0 afrikaj. Por kunigi ĉiujn oni uzis dum Solena malfermo imponan Minotomiraj-koncerthalon, situanta transtrate de la kongresejo. La kongresejon mem apudis multaj vendejoj kaj restoracioj de la fama haven-urbo.

Sendube, ni kun plezuro manĝis japanajn tempura-n kaj suŝi-n kaj ĝuis ne-japanan kuirarton. Dum la varmega Aŭgusto nin refreŝigis verda teo, mango-suko kaj glaciaĵo.

La unuiĝinta distrikto de Tokio kaj Jokohamo posedas unun el la plej grandan (en monda skalo) subteran transportan sistemon, kiu helpis al ni loĝi en nemultekosta hotelo je distanco de nur 2 haltejoj de la kongresejo. Nia hotelo staris apude de bejsbala stadiono en areo de la plej granda ĉina komunumo ekster Ĉinio. Vespere ni havis eblecon danci sub akompano de vivanta E-muziko, manĝeti buterpanojn en ne-fumanta etoso.

Kutime kongresejo estas fermata vendrede, ĉar tio estas ekskursata tago. Ni uzis ĝin por konatiĝi kun vidindaĵoj de Tokio – japana ĉefurbo. Estis vizititaj du muzeoj, fama “Akihabara” – vigla bazaro de elektronikaĵoj, marproduktoj kaj suveniroj. Estas granda pluso por ni, ke nia turista grupo estis kondukita de E-ĉiĉeronon.

Ĉi-jare finiĝis 6-jara prezidi-periodo de UEA prezidanto Renato Corsetti, je la posteno lin anstataŭigas baratano Probal Daŝgupta, elektita unuanime por la sekvantaj 3 jaroj. Interese, ke instrukcia flugfolio enhavis konsilonj kiel helpi blindulojn. Ni ekmemoris pri la nevidanta ukraina E-isto Vasil Eroŝenko (1890-1952), kiu loĝis en Japanio, instruis E-on en Tokia universitato kaj verkis E-e kaj japane.

Dum la lasta kongres-tago, kantinte “La Espero”-n, ni solene fermis la 92-an Kongreson de Esperanto kaj varme adiaŭis niajn amikojn antaŭ la reveno hejmen. Rapid-trajno “Ŝinkansen” veturigis nin al malnova ĉefurbo Kioto, kie ni pasigis 5 ripoztagojn, vizitante antikvajn templojn kaj modernajn vendejojn.

Sekure reveninte hejmen, ni estas ege feliĉaj pro la partopreno de la UK, kie ni daŭrigis realecon de la Zamenhofa revo.

GRATULO

La redakcio kaj klubanoj sincere gratulas nian usonan s-non Tim Westover, kiu gajnis la unuan premion en proza branĉo de BK'2007 pro la novelo "Ruĝvela ŝipo"

REEĤOJ

Kiam oni tradukas ion, necesas balanci signifon kontraŭ stilo. Speciale kiam temas pri muziko aŭ poezio, ritmo kaj rimo treege gravas. Ju pli longa, des pli multe malfacila havi ĉion kune kaj bone. En 1955 Jon Willarson elangligis la Edgar Allen Poe poemon "The Raven", kiu estas plej konata de denaskaj anglaj parolantoj: tre dolora, kaj tre belsonora. La ritma stilo estas majora parto de la originalo. Precize tia senco ke tre malfacilegas traduki bone. Willarson sukcesis bonege. Neniam alie ĉu mi jam legis, kaj aŭdis en mia menso, tiom longa poemo kiu tiom plene esprimas la senco kaj la ritmo de la originalo de iu de mia denaskigxa angla.

Rikardo Kverkorojo

LIBROBRETO

Unu el la plej famaj Esperanto-libroj, "Vivo de Zamenhof", estas denove havebla. Sojle de la Jokohama UK aperis ĉe UEA la sesa eldono de tiu ĉi verko, unue eldonita en 1920, nur tri jarojn post la forpaso de Lazaro Zamenhof (1859-1917). Verkis ĝin la juna sviso Edmond Privat (1889-1962). La libro jam delonge estas konsiderata klasikajo. Aperis de ĝi tradukoj en ok naciajn lingvojn. La nunan eldonon redaktis Ulrich Lins. La nova eldono estas pli abunde ilustrita, ankaŭ per multaj malpli konataj fotoj. Sekve la libro ne estas nur reeldono. La prezo de la 171-paĝa libro estas 9,00 eŭroj. Ekde samtempa mendo de 3 ekzempleroj la libroservo de UEA donas rabaton de 1/3.

POŜTMARKO

Ni jam informis pri la apero de p/marko en Ukrainio, dediĉita al la plej unua E-lernolibro por ukrainoj. Nun estas ebleco montri la aspekton (vidu la foton).



Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;
Familia membro : \$30, Regula: \$20
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn, 828 S. Ada St,
Chicago IL 60607

KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon
de ĉiu monato
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

25an de Septembro – Tina Seastrom transdonos etoson de E-kurso en San Francisko

23an de Oktobro – pri sia patro – astronomo kaj E-isto, prelegos d-ro Kordylewski

27an de Novembro - Elekta kunsido, planoj por estonto;

16an de Decembro - Zamenhofa bankedo

